

# Protokolo de la estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo

ĵaŭdon la 25-an de februaro 2021 per Zoom

(aprobata en la interkonsiliĝo la 18-an de marto 2021)

Ĉeestis

Claude Rouget, Amelie Matt kaj Mario Machlik (Tromsø)

Herman Ranes kaj Jardar Eggesbø Abrahamsen (Trondheim)

Bård Hekland (Bergen)

Lars Sandbakk (Stavanger)

## 0. Tagordo

La tagordo estis dissendita la 22-an de februaro. La tagordo aprobiĝis.

## 1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 7-an de januaro

La malneta protokolo estis dissendita la 10-an de januaro. La protokolo aprobiĝis senŝanĝe.

## 2. Jarraporto, jarkalkulo 2020

Ni pluredaktis la jarraporton por 2020. Restas kelkaj punktoj: Bård: Amaskomunikiloj, Membrostatisiko (kontroli ciferojn kun tiuj ricevitaj de Douglas), Resumo. Jardar: Grupo E-ista de Trondheim. Lars: Pri la kluboj en Bryne kaj Stavanger, Claude: Ekonomio, komenta parto. Herman: Legaco Rolf Uhlen. **Ĉiuj informoj estu enmetitaj antaŭ la sekva estrara kunveno!**

Claude havis problemon pri sia mikrofono, sed komentis skribe la jarkalkulon, kiu montras etan malprofiton. **Decido:** Claude sendos la jarkalkulon al la revizoro por aprobo.

## 3. Landa kongreso 2021

NI diskutis la enhavon de la aranĝo. La landa kongreso okazos per Zoom la 5-an kaj 6-an de junio, ambaŭtage de 14:00 ĝis 17:00. Aldone ni organizos neformalan retan kunestadon dum la vespero, de la sepa. Estos traktataj tri jarraportoj kaj jarkalkuloj kaj nova laborplano. Ni provos limigi la tempon uzatan por formala traktado de la raportoj. Aliaj diskutindaĵoj: Gazeta kaj alia kunlaboro kun niaj najbaraj asocioj, nia informa strategio.

Vespere ni volas nur mallongajn prelegetojn kaj amuzaĵojn. Ĉu Claude povos prezenti iom de sia vojaĝego? Mario povos ankaŭ organizi klasikan muzikon de Tromsø. **Decido:** Ĉiuj estraranoj pripensu eventuale aliajn temojn, tagordon ni fiksos en la sekva estrara kunsido. Bård demandos al Kim J. Henriksen, ĉu li pretos fari 15-minutan koncerteton por ni.

#### 4. Nordia kunlaboro

Mario kontaktis la svedan, finnan kaj danan estrarojn por neformala diskuto pri estonta agado. Li proponis serion de retaj aranĝoj ne tre oftaj, kie la respondeco alternas inter la asocioj. Venis kelkaj reagoj, parte pozitivaj, sed ankaŭ proponoj pri tute aliaj agadoj. Sed ĝis nun, nenio konkretiĝis.

Charlotte Scherping Larsson, la prezidanto de TEJO, konsentis prelegi por ni la 17-an de aprilo, kune kun Albert Stalin Garrido, TEJO-estrarano pri landa agado.

La svedoj tre volas, ke diskutoj okazu en ilia retejo [intere.se](http://intere.se). Bård rilatis sufiĉe pozitive al tio, Mario pli skeptike. Ĝis nun venas malpli da reagoj post aŭdiĝoj en [intere.se](http://intere.se) ol post retroŝtaj mesaĝoj. Neniu decido estis farita.

#### 5. Informado: Broŝuro, artikoloj por gazetoj

Amelie finfaris la informbroŝuron kaj dissendis loken adaptitajn versiojn al Tromsø, Trondheim, Oslo kaj Bergen. Ankaŭ ricevos Stavanger, Lars sendos kontaktdetalojn.

Ĉu ni dissendu nigra-blankan version de la broŝuro per NE-isto? **Decido:** Ne indas, ankaŭ pro la misa formato. Interesatoj povos ricevi koloran version rete.

Kjell Peder Hoff instigis la estraron traduki la gazetarajn komunikojn de UEA kaj dissendi ilin al la norvegaj gazetoj. La estraranoj skeptikas pri la efikeco de tiu agado, sed pretas fari limigitan teston.

**Decido:** Bård tradukos kelkajn komunikojn kiuj ŝajnas iom taŭgaj kaj dissendos laŭ haveblaj adreslistoj. Post kelkaj provoj, ni faros pritakson, ĉu indas daŭrigi tiun agadon.

Facebook: Bård ricevis redaktorajton al la Facebook-paĝo de NEL. Estas pr. 800 abonantoj. Li faris kelkajn aŭdiĝojn. **Decido:** Ĉiuj estraranoj sendu aktualajn ligilojn aŭ aliajn informojn al Bård por aperigo. Ni provu fari ĝisdatigon unufoje monate.

#### 6. Statutŝanĝoj de Legaco Uhlen

La estraro informiĝis 21.02.21 ke Stiftelsestilsynet nun aprobis la statutŝanĝojn sen komentoj.

**Decido:** La estraro de NEL petas la legacan estraron decidi, ĉu oni volas disdoni subvenciojn en 2021, kaj se jes, anonci tion en NE-isto kaj alimaniere.

#### 6. Eventualaĵoj

La sekva limdato por NE-isto estos la 29-an de marto.

Lars estis informita, ke Heroo vojaĝos al Alta dum la paskaj ferioj kaj tiam povos survoje kunporti pliajn librojn de Anne Karin al Oslo. **Decido:** Lars demandos al Douglas, ĉu li pretas akcepti pliajn librojn en Esperantonia

La interkonsiliĝo daŭris de 20:30 ĝis 22:10.

La venonta interkonsiliĝo okazos ĵaŭde la 18-an de februaro je 20:30 per Zoom.